



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 4 2021

## LASTMINUTA NULIGO DE MORTO-PUNO EN USONO

Julius Jones, Usono 1980, estis juĝita pro murdo en julio 1999. Dum la proceso la advokato deklaris, ke li estis tute senkulpa, S-ro Jones eĉ sciis pri tiu murdo okaze de televido kiam li estis hejme, laŭ sia deklaro. Tamen, alia kunakuzito, Christopher Jordan, akuzis lin. Ĉi tiu lasta homo akceptis konsenton kun la prokuroro post la akuzo kontraŭ Jones.

Laŭ tiu akordo, Jordan konfesis, ke li estis ŝoforo post la murdo kaj la murdisto reale estis Julius Jones. Pere de tiu deklaro li akceptis 30-jaran kondamnon en prizono, tiel li evitis morto-punon. Li eliris el malliberejo en 2014, post 15 jaroj da efektiva maliberigo. Kontraŭe Julius Jones estis kondamnita de ĵurio je morto-puno pro tiu deklaro.

Ĉe la ĵurio renkontiĝis 12 homoj, el kiuj 11 estas blankuloj, S-ro Jones estas nigrulo. Unu el la ĵurianoj asertis, ke alia ĵuriano diris, ke Jones devus esti linĉita ekster la juĝejo.

Komenciĝis tiam internacia kampanjo por nuligi tiun kondamnon.

Preskaŭ sep milionoj da homoj en la tuta mondo subskribis peton en [change.org](http://change.org), inter ili kelkaj famaj artistoj. Pri tiu kazo eĉ oni produktis televid-programon, tiam oni elstarigis difektojn kaj maljustaĵojn okaze de la proceso kontraŭ Julius Jones.



S-ro Julius Jones dum la proceso

Post daŭraj prokrastoj la ekzekuto de la kondamnito devus okazi je la 16:00 horo de la pasinta 18-a de novembro en prizono de Oklahomo. Tamen 4 horoj antaŭ tiu ago la guberniestro anstataŭigis la morto-ponon per dumviva malliberigo sen ebleco eliri el la prizono.

# Vorto de la Semajno

**Abolicii = Aboli** (tr): Per oficiala akto nuligi aŭ forigi aranĝon aŭ kutimon.

**Abolicio = Abolo**: Ago de instanco kiu abolicias aŭ abolas.

**Aboliciismo = Abolismo**: Doktrino kaj movado de tiuj, kiuj kontraŭstaras leĝ(ar)on.

- *Sklaveco estis abolita en Usono en 1865.*
- *La publika opinio petis la abolicion de la morto-puno.*
- *La abolismo de la taŭro-ludoj estas defendata en Hispanio de kelkaj politikaj partioj.*



*Miguel Hidalgo y Costilla, heroo de la meksika sendependiĝo, subskribis en la jaro 1810 leĝon kiu abolis la sklavecon.*

Ĉu vi konas la ret-paĝon de Internacia Jurista Esperanto-Asocio?



Vizitu nin ĉe [www.esperantojuro.org](http://www.esperantojuro.org)

Internacia Jurista Esperanto-Asocio [www.esperantojuro.org](http://www.esperantojuro.org) [jurista@esperanto.ac](mailto:jurista@esperanto.ac)